# NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
BILBAO (Hispanio)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (jesusmiguel.garcia@ehu.es)
Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 34-944.164.492 E-48005-
☎ portebla: 34-658.709.087
 esperantobi@gmail.com
TTT-ejo: http://www.geocities.com/esperantobilbao

**Jar-kotizoj**: Normala: 20 €. Speciala: 15 €. Familia: 35 €.
**BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550**

**NOVEMBRO/DECEMBRO 2009 (4/09)** **Nro. 80**

*La*




*gelernantoj de la nova kurso de Esperanto pozas, en la klasejo, kun la instruisto.*

**FIESTA DE ZAMENHOF**. Como es habitual en diciembre, también este año nos reuniremos para celebrar el nacimiento de L.L. Zamenhof. Esta vez será el **sábado 19 de Diciembre**. Más información en las páginas interiores.

## LOKE ...




**KRISTNASKA LOTERIO / LOTERÍA DE NAVIDAD**

Ya está disponible, en el Grupo, la habitual lotería de Navidad. Cada boleto, escrito íntegramente en Esperanto, se vende a 3,00 € (2,50 € de lotería + 0,50 € de donativo para el Grupo). Como siempre, toda la ayuda que recibamos para la venta de los boletos será bienvenida.

## NOVA KURSO DE ESPERANTO.

La pasintan 9-an de oktobro komencis baza kurso de Esperanto en nia sidejo. Al ĝi aliĝis 4 novaj gelernantoj kaj du malnovaj membroj de nia asocio. La instruisto estas Jesús García Iturrioz. Klasoj okazas ĉiuvendrede, inter la 19,30 kaj la 21,00 h.


Kompreneble, ĉiu ajn homo estos bonvena, samkiel kia ajn propagando inter gekonatuloj kaj familianoj.

## FIASKITA INTERVJUO EN “RADIO EŬSKADI.

La pasintan 6-an de novembro estis planita intervjuo al franca esperantisto en « Radio Eŭskadi ». La programo temas pri vojaĝoj. Respondeculoj de la radistacio kontaktis nian E-klubon por ke ni liveru tradukiston, tiel ke la franco postulis paroli en Esperanto anstataŭ en la franca.

Bedaŭrinde, la intervjuo ne okazis pro tio ke mortis familiano de la franca esperantisto kaj li ne povis veturi al Bilbao. Eble estontece ...

## "FIESTA DE ZAMENHOF".



Como es habitual por estas fechas, también este año nos reuniremos para conmemorar el nacimiento del creador del Esperanto, un 15 de Diciembre de 1859 (este año es su 150 aniversario).

La reunión será el **sábado 19 de Diciembre,** a las **19,30 h.** Habrá una breve charla sobre el Esperanto y, a continuación, continuaremos esa charla alrededor de una mesa, provista de aquello que aportemos, para comer, los que acudamos.

Como es habitual, el pan y las bebidas correrán por cuenta del Grupo.

Estaremos encantados de recibir la visita de todos los socios, así como de sus familiares y amigos.

## KURIOZAĴO.

"El la 10.430 enloĝantoj, kiujn enhavas Baracaldo, 5.540 parolas Esperanton, 5.490 estas vegetaranoj.

Kaj 1.400 parolas Esperanton kaj estas vegetaranoj"

*(Jacinto Miquelarena.- "Veintitrés" ("Dudek tri"). Espasa Calpe. Madrid, 1931. Paĝo 131)*

Noto: "Veintitrés estas libro, kies aŭtoro, Jacinto Miquelarena (Bilbao, 1891 – Parizo,1962), klopodis skribi humure).

*(Josu Turuzeta. Las Arenas).*

## CUOTAS DEL AÑO 2009.

Si a la izquierda de estas líneas aparece una cruz roja, es que aun no has hecho el pago de la cuota de socio correspondiente al actual año 2009. Como estamos ya a final de año, te rogamos que, si es el caso, hagas el ingreso en la cuenta del Grupo. Muchas gracias. Las cuotas vigentes, iguales que las del año 2008, son:

Cuota normal: 20,00 euros anuales.
Cuota reducida: 15,00 euros anuales.
Cuota familiar: 35,00 euros anuales.

## NE FORGESU (KAJ UZU !) LA RET-ADRESON DE NIA E-GRUPO :

**esperantobi@gmail.com**

Ni regule rigardas ĝian enhavon. Tamen, se ni ne tuj respondus, ne maltrankviliĝu : ni ne estas profesiuloj, kiuj daŭre deĵoras antaŭ komputilo. Sed certe ni respondos kiel eble plej baldaŭ.

# H.E.F.

## DEĴORADO ĈE LA HEF-Oficejo.

Sabate, de 11,00 ĝis 13,00, deĵoras Miguel, estrarano pri HEJS.

## E-ekspozicio.

Inter la 20a kaj la 31a de oktobro sukcese okazis **ekspozicio de paneloj** "El Esperanto: desafio a Babel" en Kultura Centro "Casa del Reloj" de la madrida distrikto Arganzuela. La materialo estas preta por pruntedoni al esperantaj grupoj. Temas pri 15 paneloj (1,00 x 0,70 m). Interesatoj kontaktu kun HEF.

## Demisio.

Angel Arquillos anoncis publike sian eksiĝon el la estraro de HEF kaj el la posteno de redaktoro de "Boletin".

## Ĉef-redaktoro de "Boletín".

Mi informas vin, ke la nova ĉefredaktoro de Boletín estos Alejandro Pareja, do, vi jam povas sendi materialojn al li por la venonta Boletin. Krome, la plano de la estraro de HEF estas krei redaktoran skipon. Fakte, jam Jorge Pavón anoncis, ke li okupiĝos pri la kompostado. Do, se estas aliaj volontuloj, bv. kontakti Alejandron.

*(Pedro Hernández. Prezidanto de HEF. 09/11/2009)*

## FORPASO DE JULIO ARGÜELLES.

Oni anoncis la forpason, la pasintan 30an de oktobro, de nia samideano Julio Argüelles, vigla aktivulo de la astura movado. Nian elkoran kondolencon al la familio kaj asturaj geamikoj.

*(Raúl Martínez Anguita. 11/11/2009)*

## Brila kunmemoro de la zamenhofa naskiĝdatreveno.

Jen kiel tekstas la invitilon:

D-ro Jacint Corbella i Corbella, prezidanto kaj D-ro Ramon Trias i Rubiès, ĝenerala sekretario de la Reial Acadèmia de Medicina de Catalunya, kune kun Kataluna Esperanto-Asocio invitas vin al la CELEBRADO DE LA 150a DATREVENO

DE LA NASKIĜO DE D-RO. LAZARO ZAMENHOF, OFTALMOLOGA MEDICINISTO KAJ KREINTO DE ESPERANTO, kiu okazos mardon 15 Decembro 2009 je la 7ª vespere, en la sidejo de la Reial Acadèmia de Medicina de Catalunya, Carrer del Carme 47 de Barcelona.

*(Darío Rodríguez. Madrido. 14/11/2009)*

# TRA LA MONDO ...

## La Policía de Dallas multa a una hispana por no hablar inglés.

*(24.10.09 - 13:12 - EFE | | WASHINGTON)*

El Departamento de Policía de la ciudad estadounidense de Dallas (Texas) ha calificado hoy de "error" la multa que uno de sus agentes de carretera impuso a una hispana por no hablar inglés. Según el portavoz del departamento, Warrent Michell, el cargo de no expresarse en inglés no existe y el agente cometió "un error honesto...aunque no tiene excusa".

El policía fue identificado como Gary Bromley, quien multó el pasado 2 de octubre a Ernestina Mondragón, de 48 años, tras detener su coche por hacer un giro ilegal en una carretera. La mujer tampoco presentó su licencia de conducir.

Según las normas de la ciudad de Dallas, los conductores de taxis y los chóferes de camiones comerciales deben comunicarse en inglés, pero ésta no se aplica a quienes conducen automóviles privados. La hija de la mujer explicó que el incidente ocurrió cuando su madre llevaba a su hermana menor a la escuela y no vio la señal de no girar. Agregó que los conocimientos de inglés de su madre son muy limitados.

## Libera Esperanta kantaro-vikio iĝis 1000-kanta!

Dum la lastaj tagoj kvanto de kantotekstoj, haveblaj en kantaro-viki superis 1000! Tio estas rezulto de kelkjara internacia kunlaboro, farata de esperantistoj el la tuta mondo.

Danke al la vikia teknologio, la kantaro estas malfermita por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri muziko. Iu kunlaboranto povas enmeti novan kantotekston, alia korektas erarojn, plua alia povas aldoni muziknoton aux kompletigan informon, ktp. Oni povas trovi kanton diversmaniere: laŭ kategorio, nomo aŭ per frazo entekste.

Kantoj estas aranĝataj laŭ albumoj kaj albumoj eniras diskografiojn de la koncerna aŭtoro aŭ muzikbando. Por prezentado de la kantoj vi povas trovi muzikfoliojn, akordojn por gitarludado. Vi povas sekvi la kantotekston kaj ankaŭ spekti videaĵon aŭ uzi karaokeon.

Adreso de la kantaro-vikio: http://ikso.net/kantaro/

*(Aleksej Kuznecov ka2pink@gmail.com . Fonto: Ret-Info http://www.eventoj.hu)*

## Evoluo de la membraro de UEA.

La 30-an de septembro UEA havis 5.636 individuajn membrojn, t.e., je 53 pli ol en la sama tago pasintjare, kiam la nombro estis 5.583. La pozitiva diferenco malkreskis en septembro, ĉar fine de aŭgusto ĝi estis 64.

Dum septembro (re)aliĝis 34 membroj. Mankas 70 individuaj membroj por atingi la definitivan nombron de la pasinta jaro (5.706). Laŭ la spertoj el antaŭaj jaroj, malgranda kresko de la membraro eblas sed ankoraŭ ne tute certas.

La nombro de aligitaj membroj estis 12.260. Ankoraŭ mankas 232 de la fina nombro en 2008, sed ĝi certe estos atingita kaj iom superita. Ok landaj asocioj ankoraŭ ne pagis ĉi-jare.

*(Osmo Buller, Ĝenerala Direktoro de UEA. 01/10/2009)*

## Esperanto en okcidenta Saharo.

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kunlabore kun UJSARIO (Junulara Sekcio de Fronto Polisario -reprezentanto de la popolo de Okcidenta Saharo okupita de Maroko) helpas la ekdisvastigon de la internacia lingvo Esperanto en la rifuĝintaj kampadejoj de la saharaj zonoj ne kontrolitaj de Maroko kaj apudaj zonoj en Alĝerio. UJSARIO jam aperigas informon pri ĉi tiu organizo en Esperanto, kune kun la araba, hispana, angla kaj franca lingvoj. Andaluzia Esperanto-Unuiĝo altiris la atenton de altranga membro de UJSARIO kiu eklernas esperanton. Ni havigas al UJSARIO dekon da libro-metodoj kaj vortaroj en la araba lingvo por provizi la kulturajn centrojn de la kampadejoj per tiuj esperanto-lerniloj. La TTT-paĝo de UJSARIO, kie jam aperas informoj en esperanto, estas: www.ujsario.org kaj la adreso de la naskiĝanta movado en Okcidenta Saharo estas www.sahara-esperanto.ueuo.com

Alie, en AEU oni ricevis invitilon por ĉeesti la kongreson de UJSARIO en Ausserd (sude de Okcidenta Saharo) de la 5-a ĝis la 7-a de decembro. Neniu membro de AEU povos ĉeesti, pro tio mi sciigas al ĉiuj interesitoj, ke la E-movado estas invitita ĉeesti tiun kongreson, se iu deziras ĉeesti ĝin bv. kontakti kun Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

*(José María Rodríguez Hernández, Voĉdonanto pri propagando de Esperanto de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Kordovo. 04/10/2009)*

## Ĉeesto de UEA en la reto.

Mi transskribas mesaĝon de la Ĝenerala Direktoro de UEA, Osmo Buller:

De kelkaj tagoj ekzistas profilo de Universala Esperanto-Asocio en Facebook. Tiuj, kiuj ĉeestas en Facebook, povas fariĝi ŝatantoj de UEA ĉe
http://www.facebook.com/pages/Universala-Esperanto-Asocio/179539493576?v=wall&re\f=mf#/pages/Universala-Esperanto-Asocio/179539493576

Ekde aprilo UEA havas niĉon en Ipernity, ĉefe por enretigo de filmoj pri Esperanto-temoj. Ĝia plej populara ero ghis nun estas filmo pri la Internacia Junularkunveno en 1938, dum kiu estis fondita Tutmonda Junular-Organizo, la posta TEJO. Tiu filmo estis vizitita jam ĉ. 1650 fojojn. La adreso de la "reta kinejo" estas http://www.ipernity.com/home/97850

Tria niĉo troviĝas, ekde majo, en YouTube por la novaĵbulteno UEAviva. Ĝia unua filmo, enretigita en majo, ĵus superis 3000 vizitojn. La adreso estas
http://www.youtube.com/user/UEAviva

*(Darío Rodríguez. Madrido. 10/10/2009)*

## Nobelpremiito Obama akuzata pri esperantismo.

La kontraŭuloj de la usona prezidento Barack Obama jam de longe akuzas lin pri socialismo, naziismo, islamismo kaj planado de koncentrejoj por nekonsentantoj. Nun aperis nova akuzo: Obama ne nur estas nazio, sed li krome intencas devigi ĉiujn usonanojn lerni Esperanton.

(El “klaku.net”)

## Medvedev diras ”ne” al Esperanto.

Se Rusio oficiale ekuzus Esperanton en internaciaj rilatoj, tio signifus libervolan fordonon de unu el la atributoj de nacia suvereneco, la propra lingvo. Tiel argumentas kontraŭ Esperanto la oficejo de la rusia prezidento Dmitrij Medvedev, responde al letero de Rusia Esperanto-Unio.

(El “klaku.net”)

## ZAMENHOFA PROVERBARO.




Akvo kura, akvo pura.
Al ĉiu sanktulo, apartan kandelon.

Ĉie estas varme, sed hejme plej ĉarme.
De atendo kaj espero pereis multaj sur la tero.

Ebrieco pasas post dormo, malsaĝeco neniam.

Guto malgranda, sed ŝtonon ĝi boras.



## Ŝercoj ...

- Instruisto, ĉu oni povas puni iun pro io, kion li ne faris?
- Ne, tute ne! Kial? - demandas la instruisto.
- Mi ne faris la hejmtaskon...

- Panjo, ĉu tiu ĉi infaneto, kiun ni ĵus ricevis, loĝis antaŭe en la ĉielo?
- Jes, karulo.
- Do oni certe forpelis ĝin de tie pro tio, ke ĝi senĉese ploregas.



LA ESPERANTO GRUPO DE BILBAO
DEZIRAS AL VI ĈIUJ
KIEL EBLE PLEJ DA
FELIĈO KAJ SUKCESO
DUM LA VENONTAJ FESTOTAGOJ KAJ
DUM LA NOVA JARO 2010.
KORE!

